Adam Mickiewicz,

# Memorigo

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Laŭra, ĉu niaj belaj jaroj de kunesto
estas jam ne entute de vi forgesitaj,
kiam ni nur pri ni, pri ni mem okupitaj,
volis tute ne zorgi pri l' fremda mondresto?

Kie malvarmetec' el jasmen' elplektiĝis,[2]
kie la rivereto susure fluadis,
tie ofte ni am-dezirojn malkaŝadis
unu al la alia, kaj per nokt' kovriĝis.

Malantaŭ pala nubo la luno vidiĝis,
prilumante neĝ-bruston kaj ringojn el oro;
al via ĉarmo dia graci' aldoniĝis.

Kiel mia raviĝis tiam via koro,
buŝ' al buŝo, okulo en okul' perdiĝis,
ĝem' kun ĝemo kaj ploro miksis sin kun ploro.

*Traduko de la Pola poemo "Przypomnienie" de* Adam Mickiewicz *(Adamo Mickjeviĉo, ∗1789 – †1855) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983.*

*MR-061-3b / Arg-247-500 (2004-06-20 18:48:29)*

[2] aŭ eble: kie malvarmetec' el jasmen' etendiĝis,